# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 8 Aŭgusto, 2011


*Kara Leganto, denove, preparante ĉi numeron, mi preskaŭ ploris: transmondiĝis ankoraŭ unu sindona E-isto, nia multjara samideano Karlo Offutt. Sed kion fari? Ni dediĉos nia septembran kunsidon al la memoro de W. Cebulski kaj C. Offutt: estimataj societanoj, bv preni fotojn, ekmemori historiojn, helpi al la E-societo kompili iun memoraĵaron. Anticipe dankon.*
*Sube vi ricevos ankoraŭ du pli gajajn informojn pri la IJK en Kijivo (Ukrainio) kaj pri ankoraŭ unu atingo de E-Vikipedio.*
–La Redakcio

## Karlo Offutt (1943-2011)

*Carl Offutt mortis subite dimanĉ-vespere, la 24an de Julio.*

*Li naskiĝia la 28an de Aŭgusto 1943, ricevis diplomon de Bakalaŭro de Sciencoj (psikologio) en Loyola Universitato (1961-1964), laboris por la Usona federala poŝto (USPS), Usona Trezor-ministerio ktp. Sed por ni li restos sindona adepto de nia kara lingvo: ni memoras liajn brilajn prelegoj pri komponisto Lou Silver Harrison (Junio, 2007), pri la libro kaj filmo “Gerda malaperis” (Aŭgusto, 2007). Li planis multon, sed la sorto ne permesis lin plenumi ĉion ellaboritan.*

*La funebla diservo pri C. Offutt okazis la 6an de Aŭgusto en la preĝejo St. Mary of the Lake (Sankta Maria de la Lago). Laŭ la lasta volo de la forpasinto li estis entombigita en Indiano ĉe lia patro kaj patrino. Restu li en paco.* –Araneo



***Karlo***

## IJK-2011, Kijivo, Ukrainio

Pri la ĉi jara Internacia Junulara Kongreso ni ricevis raportojn (la redakcio iom mallongigis ilin) de du samideaninoj: Natalija Pendjur (Ukrainio) kaj Emma Breuninger (Germanio). Kun ili vi povas virtuale translokiĝi sur la bordojn de Dnipro-rivero.

“…Kijivon atingis pli ol 300 partoprenantoj el la tuta mondo, eĉ el tiaj ekzotikaj por ukrainoj landoj kiel Brazilio, Argentino, Israelo, Japanio, Pakistano. Ili kovris per si mem ĉiujn surfacojn ĉirkaŭe: plankojn, ŝtuparojn kaj teron apud la bazejo – ludante, kantante, brakumante unu la alian, babilante . Kelkajn surloke manĝis aŭ dormis – la programo estis plena kaj eĉ iom laciga.





Ĉiu tago estis dediĉita al iu agado: la kunvena tago, internacia tago, ukraina tago, ekskursa tago, lingva festivalo, sporta tago, apoteoza kaj adiaŭa tago. Tradicie ĉiu tago komencis per diversnivelaj kursoj de Esperanto kaj kurso de la ukraina lingvoj. Daŭris ĝi per pelegoj, majstroklasoj kaj finis per la nokta programo – vespera koncerto, diskoteko, babilado en la trinkejo kaj gufujo. Por multaj partoprenantoj ajna tago ne finis tute – okazis, ke ili ekdormis en muzeo aŭ ĉe komputilo. Specialaj gastoj de IJK estis dueto Ĵomart kaj Nataŝa, JoMo, ankaŭ kantis Cyrille Poullet el la “PafKlik” kaj multaj aliaj. Esperanto ne estis ununura lingvo de la kantoj: oni aŭskultis kaj mem provis kanti ankaŭ la ukrainajn popolajn kantojn.

Kelkaj vortoj pri la apartaj tagoj. Dum la ukraina vespero (ukraina tago) oni spektis la teatraĵon pri ukraina tradicia festo de Ivano Kupalo. Estis ĝi sufiĉe agema. Partoprenantoj povis ne nur konatiĝi kun ukrainaj naciaj kostumoj, folkloraj karakteruloj, sed ankaŭ salti trans fajron, kiel oni tradicie dum la festo faras. Ne malpli agema estis la sporta tago kun ĝia apoteozo – piedpilko. Unue ludis ukrainaj esperantistoj kontraŭ la esperantistoj de cetera mondo, poste esperantiistoj kontraŭ la loka teamo. Futbalo estis varmega. Verdire, esperantistoj malgajnis al la lokuloj, tamen la ludon oni longe memoros kaj ridegos, spektante fotojn.

Certe IJK en Kijivo ne estis senprobleme. Manko de la varma akvo faris nian aspekton iom senhelpa... Tamen energio de la homoj estis varma, varmega, bolanta…”

“…Alveninte al la Kijiva stacidomo ni ekvidis la junulon kun la E-ŝildo, kiu atendis nin. Li klarigis al ni kiel atingi la kongresejon. Aliaj esperantistoj eĉ akompanis

nin, helpis porti la pezan bagaĝon. En la kongresejo regis iom da ĥaoso, ĉefa organizanto tre bedaŭrinde suferis de grava malsano kaj estas en la malsanulejo. Do aliaj organizantoj kaj helpantoj kompreneble havis iom da problemoj. Sed finfine ĉiuj partoprenantoj trovis siajn ĉambrojn kaj litojn. Mi estis feliĉa, estante ne plu tiel juna persono, mi povis dividi mian ĉambron kun tri simpatiaj junulinoj – rusa, usona kaj japana – do, nia ejo estis vere internacia, vere esperantista!



Kelkaj elektitaj personoj estis intervijuitaj fare de lokaj ĵurnalistoj. Poste buso veturigis nin al la “Domo de pentristoj”, kie okazis la oficiala inaŭguro de la junulara kongreso. Ĝi estis akompanata per belaj ukrainaj kantoj, dancoj kaj diversaj muzikaj prezentaĵoj. Vespere – jam tradicio dum unua tago – estis “Interkona vespero”, dum kiu ni interkonatiĝis pere de amuzaj ludoj.

Dimanĉe okazis pogrupaj ekskursoj tra la urba centro. Mi denove estis feliĉa, mia grupo estis malgranda, ĉiuj el ni havis samajn interesojn kaj nia ĉarmega gvidantino Tanja estis tre bone preparita. Ni eĉ decidis rifuzi de la vespermanĝo por plu ĝui tiun belan urbon. Verdire, mi povas diri ke mi enamiĝis al la ukraina ĉefurbo. Kia belega urbo kun tiom da parkoj, monumentoj, belaj konstruaĵoj kaj muzeoj. Ĉefa strato “Ĥreŝĉatik” dum semajnfino estas fermata por trafiko. Piedirantoj povas ĝui etoson kaj promeni trankvile meze de la larĝa strato. Tiom ege plaĉis al ni Kijivo, ke kelkaj partoprenantoj decidis denove promeni tra la urbo dum lundo, inter aliaj ankaŭ mi. Sed unue ni veturis al “Hidropark” kaj naĝis en rivero Dnipro – sen kondiĉe bezonatas almenaŭ unufoje dum restado naĝi tie, ĉu ne? Dum ekskurso homoj en transporto demandis: “Per kiu lingvo vi parolas? De kiu lando vi ĉiuj venis?” La respondo al la unua demando estis facila, sed al la dua... “Ni venas el la tuta mondo” – respondis unu knabino en trolejbuso al la pasaĝeroj. Kelkaj ekgratis kapojn. Ĉar vere, kia estas la sekreto, ke homoj el la tuta mondo unu la alian tiom facile komprenas?

Kun trista koro mi adiaŭis Kijivon – neforgeseblajn belegajn memoraĵojn mi kunportas. Restas deziro de baldaŭa reveno…”

## 150.000 artikoloj en la E-Vikipedio

En dimanĉo, 7-a de aŭgusto 2011, la Esperanta Vikipedio atingis la nombron de 150.000 artikoloj. Per tio la enciklopedio en la internacia lingvo havas lokon 27 inter la diverslingvaj versioj de Vikipedio, tuj post la araba kaj la dana versioj. La Vikipedio multe helpas al la uzado de Esperanto flanke de parolantoj en pli ol 120 landoj de ĉiuj kontinentoj kaj al ilia kleriĝo. Ĝi estas ofte konsultata paĝaro kun ĉiutage pli ol 400 000 paĝorigardoj. Tiurilate ĝi tenas lokon 34 inter la diverslingvaj versioj de Vikipedio. Aldone al la Vikipedio ekzistas en Esperanto maŝine tradukita versio de la anglalingva vikipedio, Wikitrans, kiu havas pli ol tri milionojn da artikoloj. Kvankam maŝine tradukita ĝi estas relative bone komprenebla kaj servas al multaj Esperanto-parolantoj. Maŝinaj tradukoj helpas ankaŭ en la plua ellaboro de la Vikipedio. Ekzistas du specialaj paĝoj, kiuj subtenas la kreadon de novaj artikoloj, GramTrans kaj Vikitradukilo.

*–Libera Folio*


**Adreso:**

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org


**Estraro:**

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

**MEMBROKOTIZOJ**

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

**KUNSIDOJ**

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas**
**je 7 p.t. en la Suda**
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

**SEKVANTAJ KUNSIDOJ**

23an de Aŭgusto – la UK en Kopenhago, speciala raporto de niaj membroj kaj amikoj
27an de Septembro – memorkunsido dediĉita al Walter (Wladyslaw) Cebulski kaj Karlo Offutt
25an de Oktobro, 22an de Novembro – la temoj estos anoncataj
…18an de Decembro – Zamenhofa Bankedo’11